



4(172)  
2019

# Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

**Bultenon redaktas:** ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,  
**Adreso por korespondi:** str. Sokolska 13, 30-510 KRAKÓW

Irena Łowińska

## Triote kaj home

Kien gvidas via vojo? Ĉu al cel' decida?  
Tra voj' rekta, laŭ deklivo? Kien gvidas via vivo?...  
En aktivo aŭ pasivo fuĝas temp' rapida...  
Sed ne ĉiam gvidas vivo al la cel' decida.



Propan kapablon ekzameni, antaŭ ol grimpi al montpinto.  
Troan pena don ne surprenu, sed vian forton ekzameni.  
Vin ne spertigu, nek ĉagrenu sufer' kaj hont' de malvenkinto.  
Propan kapablon ekzameni, antaŭ ol grimpi al montpinto.



Se vian amon vi konfesas, sed ne sentante ĝin aut ente,  
feliĉo tiam ne progresas, kvankam la amon vi konfesas,  
kaj ne amato fidi ĉesas se li observas vin atente.  
Do, kiam amon vi konfesas, tiam ĝin sentu plej aut ente...



Ĉu diri sincere pri sia sufero? Ĉu iun ĝi ekinteresos?...  
Pli gravaj aferoj ja svarmas sur tero. Ne diru tutveron pri propra sufero.  
Eĉ tuja apero de larmo-rivero malmultajn impresi sukcesos.  
Ne diru prefere pri propra sufero, ĉar ĝi onin ne interesos!



Destinon propan vi ne evitos, eĉ se forfuĝon vi entreprenos.  
Ĉu vi hezitos, ribelos, spritos, destinon vian vi ne evitos.  
Kvankam alia voj' vin ekscitos, fatal' vin trovos, kaptos kaj trenos...  
Neniu propan sorton evitos, vane forfuĝon li entreprenos!



## La unua esperanta turneo: diversaj nacioj kaj kulturoj, sed nur unu komuna lingvo — Esperanto

Pasintjare, septembre, dum komuna veturado al Złotoryja por prezenti en mezlernejo Esperanton, ekestis nia ideo rekomendi Esperanton en diversaj landoj pere de programo, kiu estos prezentota fare de la eksterlandanoj nur Esperante kun traduko en la lokan lingvon. Ni deziris montri, ke por viziti diversajn landojn kaj ekkoni iliajn kulturon, historion kaj homojn sufiĉas koni nur Esperanton.

Post kelkmonataj preparoj, venkinte multajn malfacilaĵojn, ni komencis realigi nian programon ĉi-jare. Ĝi komenciĝis en Pollando la 4an de junio kaj finiĝis la 12an de junio. La unua etapo estis Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo en Germanio, kaj la dua etapo estis Fleury-les-Aubrais en Francio. Ni preparis abundan programon kun muziko, dancoj kaj prelego pri Malsupra Silezio – sudokcidenta regiono de Pollando – kaj ĉefe pri ĝia ĉefurbo, Vroclavo. Ni ankaŭ proponis polajn manĝaĵojn. Pro tio la partoprenontoj, kiuj ankoraŭ ne konis Esperanton, intense lernis ĝin kaj penis konstrui konvenan scenan programon.

La ideo de nia turneo estis ne nur venigi la lokajn esperantistojn, ĉar ne temis pri klasika E-aranĝo, sed ĉefe pri diskonigo de Esperanto al larĝa publiko per praktika ekzerco: vidigi kaj aŭdiĝi Esperanton, kaj do pruvi al neesperantistoj, ke nia internacia lingvo vere funkcias. Konante ĝi ni facile interkompreniĝas kun homoj el diversaj landoj sen koni ilian lingvon.

La vojaĝgrupo estis diversaĝa (gejunuloj, plenkreskuloj kaj pliaĝuloj) kaj konsistis el personoj loĝantaj en Lubin, Vroclavo kaj Góra (malsuprasileziaj urboj, en kiuj aktivis esperantistoj). La organizanto – Eŭropa Centro de Interkultura Edukado sukcesis ricevi monsubtenon de Departamento de Vroclavo-Prezidento kaj de francaj esperantistoj.

Ni elektis Herzberg kiel la unuan etapon, ĉar ni ne sukcesis prepari nian restadon kaj prezenti nian programon en alia germana urbo. Tamen la elekto montriĝis perfekta, kvankam la distanco inter Herzberg kaj Fleury-les-Aubrais estas tre granda. Nian programon ni prezentis en granda salono de la bela hotelo Zum Pass en Herzberg-Sieber, kie ni ankaŭ loĝis. Nia alveno al Herzberg estis preskaŭ lastmomente interkonsentita kun lokaj esperantistoj kaj do ne estis multe da tempo por prepari grandan reklamon en la regiono, sed malgraŭ tio la hotelsalono estis plenplena. Plenis ĝin ĉefe la geamikoj de Małgosia Komarnicka, kiu pasigis en Herzberg 10 monatojn kadre de Grundtvig-Asistanteco antaŭ 10 jaroj. La geamikoj invitis siajn familianojn, konatojn kaj najbarojn por partopreni la polan programon pere de Esperanto kun traduko en la germanan. La reprezentantoj de lokaj esperantistoj, Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy, invitis la urbestron de Herzberg, sinjoron Lutz Peters, kiu amuziĝis ĝis la fino de la programo. La publiko admiris la dancojn de la pliaĝaj kuraĝulinoj el la dancgrupo „Gracje”. Kantis pole kaj esperante blindulo Wojtek Ławnikowicz kun propra majstra gitara akompano kaj gejunuloj el Góra, kiuj dum nur unu monato kreis la muzikgrupon „Na-Raz” kaj ellernis multajn E-kantojn. Dank’ al la prelego de Małgosia Komarnicka multaj personoj decidis viziti Malsupran Silezion kaj ĝian ĉefurbon Vroclavon. La publiko havis ankaŭ eblon admiradi diversajn manlaboraĵojn (belajn kaj elegantajn galanteriojn, korbojn, juvelaĵojn k.a.), kiujn preparis Bożena Zajączkowska el eluzita papero, plastaj boteloj kaj plantoj. Ĉe la fino de la programo la publiko estis regalita per tipa pola manĝaĵo, pri kiu zorgis Ryszard Komarnicki kaj Teresa Sybilak. Poste ĉiuj estis invititaj komune danci kaj kanti.

Nia turneo komenciĝis en amika esperanta etoso kaj bona prezentado de pola regiono pere de Esperanto.

Al Francio ni alvenis vespere, la 6-an de junio. Ni estis bele salutitaj de la urbo-estraro en la urbodomo, sed bedaŭrinde, tuj venis problemoj kaŭzitaj pro neatendita manko de gastigantoj. Tial la dispartigo de la alvenintoj inter lastmomente trovitaj personoj emaj gastigi nin. Daŭrajn malfacilaĵojn kaŭzis lokoj tre foraj unu de la alia kaj gastigantoj favoraj al ni, sed ne konantaj Esperanton.

La sekvan tagon la lokaj esperantistaj organizantoj ne alvenis ĝustatempe al la urba biblioteko por helpi prepari la prezenton de nia programo. Malgraŭ tio ni sukcesis. Małgosia prezentis lumbildaron pri Vroclavo kaj Malsupra Silezio kun lerta traduko de Feliks Wandervogel. La loka publiko vere interesiĝis pri tiu prezentado de nia regiono. Sian arton montris ankaŭ la dancistinoj, la muzikgrupo kaj Wojtek, kiu entuziasmigis la aŭskultantaron per sia profesia kantnivelo. Bożena ĉiĵoje prezentis bildojn el sekigitaj eroj de plantoj nomatajn pollingve „liściaki” (foliaĵoj). La publiko, dank’ al Ryszard kaj Teresa, estis regalita per pola manĝaĵo. Ĉe la fino la franca publiko kaj poloj kune dancis kaj amuziĝis.

Poste, bedaŭrinde, estiĝis alia problemo: la urbo-estraro iom „preteratentis” nian viziton. Dum la sabata muzikfesto en la urba parko ni devis akre barakti ĝis la lasta minuto, por ke niaj muzikistoj kaj dancistoj povu aliri la scenejon kaj prezenti sian programon nur dum kelkaj minutoj. Tial la publiko ne povis aŭskulti la belegan voĉon de nia kantisto Wojtek, ĉar iu nedefinita organizanto ne konsentis enskribi lin en sian liston. Pro tiuj malfacilaĵoj oni ne devas tamen opinii, ke nia programo fiaskis. Kontraŭe, la dancgrupo „Gracje” kaj la muzikgrupo „Na-Raz” eĉ dum siaj kelkaj minutoj mirigis la publikon. Tiuj altkvalitaj minutoj forte impresis la kolektiĝintajn en la parko homojn, kiuj komencis tiam ĝoje amuziĝi dancante, kaj eĉ provante kanti la refrenon, kion ili ne faris dum la aliaj prezentadoj.

Kvankam ankaŭ la vetero ne favoris nin, dum la sabata festo en la parko Bożena renkontis apud sia stando floremulojn kaj recikligemulojn – infanojn kaj iliajn gepatrojn. Krome ni ne forgesu pri la pola kuirarto, ĉar polaj dolĉaĵoj, kolbasoj kaj supo „żurek” ĉie bongustegis al la publiko!

Pro la pluva vetero ne okazis dimanĉa muzikfesto en la parko. Tamen ni renkontiĝis en la urbodomo kun la urbestro de Fleury-les-Aubrais. Ŝi dankis al ni pro nia alveno kaj belega programo. Re prezentanto de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado dankis ĉefe pro la eksterordinara gastamo de la francaj familioj, kiuj ne konante Esperanton klopodis krei vere amikan etoson. Wojtek zorgis pri muzika kontribuo al la renkontiĝo, kantante E-kantojn.

La plej belaj kaj neforgeseblaj momentoj okazis dum la vizito al bazlernejo, kie Bożena okupiĝis pri infanoj kaj montris al ili kiel komponi artaĵojn el sekigitaj floroj. Wojtek gitarludis kaj Małgosia, Teresa, Ryszard, Jola kaj la interpretanto Feliks helpis al Bożena. Multe da partoprenantoj de tiu laborsesio vere ekinteresiĝis pri la afero kaj certe plue trejniĝos. Ĉar ĉiuj infanoj ne povis samtempe partopreni en la laborsesio, du grupoj alterne dancis kun „Gracje” aŭ Kantis kun „Na-Raz”. Bela tago, bela etoso dank’ al la sincera partopreno de la lernejestroj, instruistinoj kaj... kuiristinoj, kiuj preparis la tagmanĝon por ni.

Nian dankon meritas ankaŭ la poldevena grupo de Orléans, „Loire-Vistule”, kiu ĉiĉeronis nin tra la mezepoka kvartalo de sia urbo kaj havigis al ni interpretistinojn, kiu dum nia vizito al la mirindaj kasteloj en Blois kaj en Chambord kompetente tradukis el la franca en la polan.

Dum la adiaŭa vespero en la kastelo „La Brossette” ni longe amuziĝis ĉe bongusta manĝaĵo kaj kantoj de Wojtek kaj nia muzikgrupo, rememorante nur pozitivajn momentojn de nia restado. Ni bele dankis per valoraj donacoj al ĉiuj 11 personoj, kiuj okupiĝis pri la preparado de nia alveno kaj restado.

Ni revenis hejmen kun novaj spertoj, sento de memvaloro pro organizo de la granda evento kaj kun novaj amikecoj.

Małgosia Komarnicka, Feliks Wandervogel, junio 2019

[www.ecem.com.pl](http://www.ecem.com.pl)

## Ilumino de la koro

Tio okazis en jaroj sepdekaj de la pasinta jarcento. Mi venis al Kalifornio kaj ekloĝis en komunumo. Mi vivis de tago al tago.

Post iom da tempo mi eksciis, ke mi havas hepatiton. Mi decidis reveni al la sano en luita kabano situata en Montoj de Santa Cruz. Ĉiunokte mi vomis. Mia haŭto estis flava kaj mi sentis, ke mi estas ĉe limo de la fortoj – kaj fizike kaj mense. Mi rezignis de tuta sia ĝisnuna vivo kaj ne sciis, kion fari.

Iun fojon, meze de la nokto mi komencis aŭdi en ĉi tiu senvivejo kantojn. Mi vekigis kaj elrigardis tra kovrita per gutoj da roso fenestro ĉe la lito. Ekstere sidis la dika viro tenanta la manon sur sia nigra kapkovrilo. En la kapo mi aŭdis laŭtajn sonojn de gongoj kaj kantoj. La viro longe ne moviĝis de la loko. Finfine mi denove ekdormis. Kiam la sekvontan tagon mi vekigis kaj ekrigardis spegulon, mia haŭto havis normalan nuancon. Mi fartis nekompareble pli bone. Unuan fojon de multaj semajnoj mi venis promeni en arbaro. Mi eksidis ĉe torento kaj komencis plori.

Iom pli poste, mi aliĝis al hipia teatra grupo, fascinata pro la tibeta kulturo kaj alflugis kun ĝi al Katmanduo.

Karmapa la Deksesa, la tibeta darma-majstro, unuan fojon de dektri jaroj alveturis al Katmanduo. Kune kun du aliaj homoj el Okcidento mi decidis kun li renkontiĝi. Li diris, ke esperis nian viziton. Mi estis mirigita. Ĝuste lin mi ekvidis trans fenestro en Santa Cruz. Ni eksciis, ke Karmapa povas aperi en niaj sonĝoj kaj tiamaniere kuraci niajn malsanojn.

La majstro estis raviĝinta pro nia vizito kaj post multaj pasigitaj kune tagoj diris al ni, ke en la antaŭa vivo ni ĉiuj tri estis tibetanoj kaj estas liaj malnovaj kamaradoj.

Unu el la pli oldaj lamaoj montris al ni foton de la monaĥejo, en kiu ni loĝis. Sendepende de tio, ĉu estis ĝi vero aŭ ne, mi sentis min tiel, kvazaŭ mi revenus hejmen.

Nun, tridek du jarojn pli poste, ni ĉiuj tri mem estas lamaoj.

tradukis: *Marta Michałowska*

## Spritaĵoj pri virinoj

La edzino plendas: – Ĉiuj niaj najbarinoj vestiĝas laŭmode, libertempas eksterlande, veturas per luksaj aŭtoj. Nur mi vivas kiel Cindrulino.

La edzo rimarkas: – Do vi mem konfesas, ke vivas kiel en la fabelo!



Interparolas du viroj : – Vi certe estas feliĉa, vi havas malnovan oron kaj malnovan vinon.

– Jes, sed por tion akiri mi devis preni oldan edzinon.



Viro en policejo anoncas malaperon de la edzino.

– Kiam tio okazis? – demandas policisto.

– Antaŭ du semajnoj.

– Kial do vi tiel malfrue parolas pri ĉi afero?

– Ĉar komence mi ne povis ekkredi je mia feliĉo.



Kia estas diferenco inter hundo kaj edzino?

– Hundo bojas al fremduloj kaj koketas la proksimulon. Edzino koketas fremdulojn kaj bojas al la proksimulo.

